



Bulgaria

ESPERANTISTO






La prezidantaro de la 39-a Kongreso de la Bulgara Esperantista Asocio. La prezidanto de BEA Nikola Aleksiev legas la raporton de CK.



Solena momento: sonas la E-himno



ENHAVO

Al plua aktivigo de nia Esperanto-movado	I
La 39-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj	2
La oficialaj salutparoladoj	3
La salutparoladoj de eksterlandaj gastoj	5
La diskutado	7
La rezolucio	8
La nova Centra Estraro	12
Honoraj membroj de BEA	13
Telegramoj de la 39-a Kongreso	13
La 39-a en la gazetaro, radio kaj televido	14
Lili Petkova. Bildekspozicio „Per Esperanto tra la mondo“	15
Ivan Severnjaški. La majstro kun la oraj manoj	16
N. Kabakčieva. La malĝojo kaj la forto de la homo	16
Ivan Sergeev. Estas tia orkestro	III
* * * Deziras korespondi	III

Sur la kovrilpaĝo:

Partoprenantoj en la 39-a Kongreso de BEA antaŭ la Monumento de la Libero en Ruse

Redakta Komitato: Kurĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Ĥristo GO-ROV, Asen GRIGOROV, Stefka ĤRISTOVA, Nenko JONKOV, Krâstju KARUCIN, Haim LEVI.

Administra sekretario kaj korektanto:
Minko CONKOVSKI

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29

Ekster la kongresejo: reprezentantoj el diversaj nacioj el diversaj generacioj. Inter la starantoj maldekstre doc. S. Podkaminer.



AL PLUA AKTIVIGO DE NIA ESPERANTO-MOVADO

La 39-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj jam estas malantaŭ ni. En nia memoro restas por ĉiam la bildo de la blua Danubo kun ĝiaj blankaj ŝipoj kaj la bildo de la kongresurbo Ruse kun ĝia klasika kaj novstila arkitekturo. En julio tie dum kelkaj tagoj vaste sonis nia bela lingvo Esperanto.

Neniam ni forgesos la gastamajn esperantistojn de Ruse, junajn kaj maljunajn, kiuj senlace laboris por bone organizi la kongreson kaj certigi por la mil kongresanoj enhavoriĉan, interesan, utilan kaj agrablan pasigon de la tempo.

Neforgeseblaj por ĉiam restos la konatiĝoj kun gesamideanoj el diversaj anguloj de nia patrolando kaj speciale kun kongresanoj el eksterlando — el USSR, Pollando, ĈSSR, GDR, Hungario, Svislando, el niaj najbarlandoj Jugoslavio, Rumanio, Grekio, Turkio. Dank' al la partopreno de tiuj geamikoj la 39-a kongreso similis al internacia aranĝo. Novaj kaj malnovaj esperantistoj povis ĝui konversaciojn, promenadojn kaj simplan kunestadon kun ili, interŝanĝi spertojn kaj pensojn, ekhavi novajn amikojn.

Sed nur la belaj impresoj kaj rememoroj neniam povas elĉerpi la valoron de unu kongreso. Nia 39-a estas gravega precipe pro la taskoj, kiujn ĝi starigis antaŭ la bulgara esperantistaro. Traktitaj en la estrara raporto kaj en la vigla diskutado, la plej gravaj el tiuj taskoj estas fiksitaj en la kongresa rezolucio. Tuja devo de ĉiu distrikta kaj societa estraro estas trastudi plej atente tiujn dokumentojn, konigi ilin al la tuta membraro, surbaze de ili ellabori konkretan planon por agado kaj utiligi ĉies fortojn por ĝia realigo. Aparte grava elstaras la tasko pri serioza laboro inter la junularo, por kio oni nepre bezonas kunordigon de la fortoj kune kun la Komsomolo. Gravega estas ankaŭ nia laboro inter la mezaĝuloj, inter la instruistoj kaj aliaj fakuloj. Ni devas trovi vojon kaj formojon por altiri ilin al la E-movado.

Specialajn zorgojn ni devas havi al la kursa laboro — efektiviĝi ĝin je pli alta, moderna metodika nivelo, organizi plurajn kursojn ne nur por komencantoj, sed ankaŭ por progresintoj. Plialtigi la lingvan nivelon de niaj esperantistoj estas aparte necesa nun. Tio eblas nur se ni interesigos pri Esperanto la profesiajn instruistojn, se ni altiros ilin kiel aktivulojn de nia Movado.


Ĉiu distrikta estraro devas tuj ellabori konkretan planon por revivigi tiujn E-societojn, kiuj jam estingiĝis, kaj por fondi novajn societojn. En ĉiu pli granda loĝloko devas esti E-societo. La organiza kaj financa stabiligo de la societoj, la pliriĉigo kaj variigo de ilia interna vivo, de ilia kulturamasa kaj propaganda laboro devas esti konstanta kaj sistema zorgo de la societaj kaj distriktaj estraroj.

En la momento unu el la plej aktualaj niaj taskoj estas la abonkamparino de la asocia organo. Ni ne devas permesi cedon de la jam atingita pozicio — 6000 abonantoj, — malgraŭ la plialtiĝo de la abonkotiĝo laŭ la kongresa decido. La ĝisnuna abonprezo estis tro malalta kaj tio ĉiam kaŭzis perdojn al la Asocio. Aktive ni devas kolekti abonojn ankaŭ por la valoraj gazetoj „Paco“ kaj „Scienca Mondo“.

La tuteca aktivigo kaj plifirmigo de nia E-movado nun certe kondukos nin al brila solvo de la plej granda tasko — dommastri inde la 63-an Universalan Kongreson de Esperanto, kiu okazos en Varna en 1978. Ĝi devas esti pli impona ol la 48-a UK, okazinta en Sofio en 1963. La bulgara Esperanto-movado havas kaj spertojn kaj fortojn por tio. Kaj ni devas atingi ĝin!

La 39-A KONGRESO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

10—12 de julio, Ruse



Dum la tri kongresaj tagoj la belega ĉedanuba urbo Ruse estiĝis vige pulsanta koro de la bulgara E-movado. Oni eksentis tion jam la 10-an, sabate, kiam komenciĝis amasa alvenado de verdstelanoj el ĉiuj anguloj de nia Patrolando. Elokvente pri tio parolis ankaŭ la amasa interkona vespero.

La inaŭguro de la kongreso okazis dimanĉe, la 11-an. La salono de la opero en Ruse estis plenplena. Impona milnombra ĉeestantaro! En la prezidantaro okupis lokon la oficialaj partiaj, ŝtataj kaj sociaj reprezentantoj, eksterlandaj gastoj, la membroj de la Buroo de CK de BEA, veteranoj de la bulgara E-movado, aktivuloj de DK de BEA en Ruse k. a.

Ĝuste je la 8,30 eksonis la himno de Popola Respubliko Bulgario, poste — „La Espero“. Jurpioniroj enmanigis florojn al la anoj de la prezidantaro.

Nikola Aleksiev — la prezidanto de BEA, malfermis la kongreson kaj alvokis la kon-

gresanojn honori per ekstara kaj unuminuta silento la memoron de la forpasintaj dum la lastaj jaroj elstaraj bulgaraj esperantistoj Simeon Petkov, Ivan Bataklijev, Georgi Markov, Simeon Ĉirpanliev, Stefan Kiragiev, Ivan Canev kaj la granda hungara E-poeto Kolomano Kaloczay.

Poste li substrekis la fakton, ke la kongreson honoris per sia ĉeesto reprezentantoj de DK kaj UK de BKP, de la Nacia Konsilantaro kaj DK de Patrolanda Fronto, de la Ministerio de Popola Klerigo, de CK de Komsomolo, de la Nacia Pacdefenda Komitato, de la Komitato de Eŭropa Sekureco, de la Asocio de Filatelistoj, de la Bulgara Esperantista Kooperativo. Li notis ankaŭ la ĉeeston de reprezentantoj de: UEA, MEM, la E-asocioj en Ĉeĥio, GDR, Grekio, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, Slovakio, Sovetunio, Svisio, Turkio.

Sekvis salutparoladoj de la bulgaraj oficialaj reprezentantoj, kiuj estis tradukitaj en Esperanton por la eksterlandaj gastoj.

Negranda paŭzo kaj la kongresa laboro kontinuus. Estis elektitaj la necesaj laborkomisionoj. La prezidanto de BEA legis la raporton de CK pri la ĝisnuna agado. Komenciĝis la diskutado, ankaŭ la salutparoladoj de la eksterlandaj gastoj.

Fine de la antaŭtagmeza kunsido okazis impona manifestacio tra la urbo al la monumento de la granda Lenin. Frunte ludis muzik-orkestro. Antaŭ la monumenton de Lenin la kongresanoj prezentis florkronon kaj multajn florbukedojn.

Posttagmeze — laborkunsido.

La vesperon — granda koncerto en la operejo. Partopenis artistoj de la Bulgara Esperanta Teatro: Petro Vuĉkov, Todor Jurukov, Ĵorĵeta Ĉakârova, Nikolaj Binev, Iskra Radeva, S. Muhibjan ka. Ili prezentis fragmenton el la



komedioj „La barbiro de Sevilla“ de Beaumarchais (Bomarŝe) kaj „Lernejo de virinoj“ de Molière (Molier). Partoprenis ankaŭ la operkantistino Marija Angelova, la artistoj-kantistoj Veselin Damjanov kaj Miŝo Zdravev, elstara junpionira ĥoro kaj folkloro dancensemblo el Ruse ka.

La 12-an antaŭtagmeze la kunsido estis dediĉita al plua diskutado. La kongreso akceptis rezolucion, kelkajn ŝanĝojn en la statuto de la Asocio, honorajn membrojn de BEA, saluttelegramojn. Fine oni elektis la novan gvidorganon, kiu konekse kun la ŝanĝoj en la

statuto, estos nomata Centra Estraro de BEA.

Posttagmeze okazis kunvenoj de la sekcioj de BEA: junulara, instruista, fervojista, poŝtista, turista, medicinista, literatura, filologa, de la sciencistoj, de MEM, de E-veteranoj, de foto- kaj kinoamatoroj, vilaĝmastrumaj specialistoj ka.

Enkadre de la Kongreso estis malfermita ekspozicio „Esperanto en servo de la paco kaj la internacia amikeco“ el verkoj de esperantistoj — pentraĵoj de Prodan Prodanov (Sofio) kaj fotoj de Zdravko Nikolov (Veliko Târnovo).

LA OFICIALAJ SALUTPAROLADOJ

(eltiraĵoj)

Raĉo Stojanov

sekretario de DK de la Bulgara Komunista Partio en Ruse

Karakteriza trajto de BKP kaj de la bulgara popolo estas la internaciismo. Sekvante la principojn de la marksismo-leninismo la bulgaraj komunistoj kaj la tuta bulgara popolo aktive partoprenas la batalon por socialisma rekonstruo de la mondo, por defendo de la akiraĵoj de la socialisma revolucio, de la paco kaj la progreso. Tial la principojn de la E-movado ni akceptas kaj utiligas por atingi kompreniĝon kaj pacon inter la popoloj.

Mi deklaras, ke ni estas kontentaj pri la aktiveco de la bulgaraj esperantistoj. Tial la socio de Ruse ankaŭ estonte donos la necesan helpon al la E-movado.

Asen Pavlov

sekretario de la Nacia Konsilantaro de Patrolanda Fronto

Ni devas kun profunda estimo kaj danko substreki, ke la kreinto de Esperanto d-ro Zamenhof estis inspirita de granda kaj altnobla deziro — doni al la homaro facilan, esprimriĉan lingvon. Lia ĉefa ideo estis la amikeco, la kompreniĝo, la paco inter la popoloj, por ke ili povu en kunlaboro kaj demokratio, per reciproka helpo kaj socia progreso atingi bonstaton kaj feliĉon por la loĝantoj de nia komuna patriro — la Tero. Tiun testamenton de Zamenhof la bulgaraj esperantistoj sankte gardas kaj aktive laboras por ĝia realigo.

En nia lando Esperanto estis lernata jam antaŭ la Unua Mondmilito. Post la milito ĝi fariĝis tre populara. Dum la jaroj 1921—23, ĉe la regado de la Agrarista Partio frunte kun Aleksandro Stambolijski, Esperanto estis enkondukita fakultative en la realajn gimnaziojn. Estis propono, ke ĝi estu enkondukita kiel deviga

ankaŭ en la progimnaziojn (V—VII klasojn). Sed la monarkofaŝisma puĉo je la 9-a de junio 1923 fiaskigis Esperanton en la lernejoj.

Nun, en nova Bulgario, BEA disvolvas aktivan populutilan agadon. Ĝi estas kolektiva membro de Patrolanda Fronto, kio donas al ĝi eblecon profiti tiun preskaŭ kvarmilionan demokratian organizaĵon de nia popolo por ankoraŭ pri sukcese popularigi Esperanton, ĝian noblan ideon kaj celon.

Esperanto estas lingvo ne nur de pasinteca humana agado, sed des pli ĝi estas lingvo de la estonteco, lingvo de paco, amikeco kaj kunlaborado inter la popoloj.

Elka Stefanova

Unua sekretario de DK de Komsomolo en Ruse

Mi estas komisiita saluti la kongreson de la bulgaraj esperantistoj en la nomo de CK de Komsomolo. La Junkomunista Unuiĝo ĉiam opiniis, ke unu el la plej gravaj ĝiaj taskoj estas la edukado de la juna generacio en spirito de arda patriotismo kaj internaciismo. Tamen ĝi, la Komsomolo, ne faras tiun gravegan laboron sola, sed kunage kun la ceteraj amasaj organizaĵoj. Dum la lastaj jaroj ĝiaj ligoj kun BEA kaj speciale kun ĝia junulara sekcio plifortiĝas. Aparte notinda estas la kunagado kun la junaj esperantistoj rilate internaciajn laborbrigadojn, seminariojn ks., kiuj kontribuas por la internacia edukado de la bulgara junularo. Nun pli ol 4000 gejunuloj okupiĝas pri Esperanto — tiu nobla, socie utila agado.

CK de Komsomolo taksas pozitive la agadon de la bulgara E-junularo kaj estonte donos pli da atento al Esperanto kiel eduka rimedo, helpo por ĝia disvastigo inter la bulgara junularo.

Samtempe ni opinias, ke nun nia komuna agado inter la junularo devas servi enunte al tiuj gravaj taskoj, kiuj estis starigitaj en la raporto de k-do Todor Jivkov antaŭ la XI-a



Kongreso de BKP : bone utiligi la liberan tempon de la junaj homoj, prudente organizi ilian kulturenan ripozadon, krei efikan tutpopolan movadon por estetika edukado ktp. En tiu rilato la E-agado ankaŭ povas doni valoran kontribuon. Ĝi devas eniri pli vaste la agadon de la junularaj kluboj, en la klubojn de internacia edukado. Estas necese pli aktive labori por multigi la rombron de juruloj-esperantistoj, aparte inter la laborista junularo.

Niaj komunaj klopodoj devas direktiĝi al pliriĉigo de la enhavo de ĉiuj iniciatoj kaj aranĝoj de la E-junularo — por paco kaj kunlaboro inter la popoloj, por feliĉo de la tuta homaro.

Rumjana Todorova

el la Ministerio de Popola Klerigo

Kun ĝojo kaj emocio mi plerumas la aĝablan komision — saluti vian kongreson en la nomo de la Ministerio de Popola Klerigo.

La esperantista movado estis kaj estos unu el la fortoj, kiuj sincere batalas por kompreniĝo kaj kunlaboro inter la popoloj. Ĝia baza ideo estas la ideo pri paco, demokratio kaj socia progreso. Jam de sia naskiĝo Esperanto servas al althumanaj celoj. Lingvo, kreita por estigi vastan kaj amasan komunikadon inter la homoj, lingvo, kiu forigas la lingvajn barierojn inter la popoloj, ne povas ne esti humana.

BKP kaj nia Popola Registaro merite rekonas la roblan agadon de la esperantistoj tiel en nia lando, kiel en la tuta mondo. Ne estas dubo, ke la bulgaraj esperantistoj, kiuj ĉiam marŝis en la fruntaj vicoj de la kreadoj de rova, socialisma socio kaj en la batalo por paco, kompreniĝo kaj unuigo inter la popoloj, ankaŭ nun doros ĉiujn fortojn kaj korojn por fari viva realejo la decidojn de la glora BKP kaj de sia libera popolo.

Cvijtko Cvethov

prezidanto de la Distrikta Pacdefenda Komitato kaj ĉefredaktoro de j. „Dunavska Pravda“ — Ruse

Kun granda ĝojo kaj sento de alta respondeco mi plerumas la komision de la Nacia Pacdefenda Komitato saluti vian imponan forumon.

Urue mi deziras subŝteki, ke la koroj de niaj du movadoj — la esperantista kaj la pacdefenda — batas en sama ritmo.

La bulgara pacdefenda movado — kaj tio estas nia tuta popolo — estas unu el la plej aktivaj kaj konsekvencaj taĉmentoj de la tuta monda pacamaj fortoj. Ni estas inspirataj

de la testamento de l'granda Georgi Dimitrov — gardi kiel la pupilon de niaj okuloj la socialismajn akiraĵojn de nia laborpopolo. Por konstrui daŭre la maturan socialisman socion en nia Patrolardo ni bezonas nur pacon, pacon kaj ankoraŭfoje pacon. Tial ni varme subtenas la vortojn de nia partia kaj ŝtata gvidanto Todor Ĵivkov, ke la serenigo, la malstreĉigo en la internaciaj rilatoj re estas uru el du vojoj por nia mondo, sed ĝi estas la rura vojo.

La mondo laciĝis stari sur monto de armiloj — diris Leonid Breĵnev. Sed la paco havas ankaŭ sian potencon armilon — tio estas la pacmovado de la popoloj, ilia batalo kontraŭ la imperiismo — por socia progreso, por kulturo kaj homa feliĉo. Aparte grandan forton havas la nova Stokholma Apelo por malarmiĝo. La milioj da homsubkriboj sub tiu Apelo posedas ekskluzivan forton, antaŭ kiu mu'os la tuta raketa-nuklea arsenalo de la imperiistoj. Ni kredas, ke ankaŭ vi, la esperantistoj, fidele laŭ pacamikoj kaj pacbatalantoj, kontribuos per ĉiuj fortoj por kolekti maksimuman kvanton da subskriboj.

Jako Jakov

prezidanto de la Distrikta Estraro de l'Asocio de la Bulgaraj Filatelistoj

Ni alte taksas la agadon de BEA. Tial ni donas grandan signifon al la kontrakto pri kunlaboro, kiun antaŭ du jaroj oni subskribis inter niaj du asocioj. Jam estas bona tradicio la aranĝado de komunaj filatelaj ekspozicioj je E-temo. Aktivan agadon inter la esperantistoj-filatelistoj disvolvas la klubo „Amika Rondo“.

Ni estas optimistoj, ke estonte nia kunagado pli kaj pli kreskos. Ni opinias utila la fondon de sekcioj de esperantistoj-filatelistoj en la loĝlokoj, la efektivigon de pli multaj kunaj iniciatoj, ekspozicioj, ekskursoj, rekordiĝoj, vesperoj, diskutadoj, eldorado de metodika helpilo „Esperanto en la filatelo“ ktp. Ekde nun oni devas fari la necesajn paŝojn por aranĝi grandan ekspozicion enkadre de la 63-a UK de Esperanto en Varna, kiun partoprenu esperantistoj-filatelistoj el la tuta mondo.

Nur tiel, man-en-mano, ni povos reciproke riĉigi nian agadon kaj doni nian kontribuon en la konstruado de matura socialisma socio en nia lando.

Julija Cankova

el la Bulgara Esperantista Kooperativo

La Bulgara Esperantista Kooperativo, sub la gvido de BEA, disvolvas utilan propagadon de Esperanto en nia lando. Ĝi eldonas kaj vendas E-lerrolibrojn kaj aliajn instruhelpilojn, E-literaturon, insignojn, bk, gramofondiskojn,



memordonacojn k. a. Apud v. Druĵevo en la Balkan-montaro ĝi kreis tendarlernejojn por lernantoj kaj plenaĝuloj. En siaj 12 magazenoj ĉiujare ĝi havas spezon de 1 miliono da levoj. Pro la bona agado de la kolektivo de BEK ĝi ricevis la flagon de la laborgloro por la unua monatario de 1976 j. kaj fariĝis distingulo de la Urba Kooperativa Unuiĝo en Sofio.

Antaŭ 30 jaroj, kiam BEK estis fondita, ĝi havis 100 membrojn, — nun 1400 membrojn-esperantistojn.

La gvidantaro de BEK certigas la kongreson, ke ĝi obstine laboros por plua disvastigo de Esperanto en nia lando, por novaj sukcesoj de la bulgara E-movado.

LA SALUTPAROLOJ DE EKSTERLANDAJ GASTOJ

doc. SEMJON PODKAMINER

vicprezidanto de MEM

Dank'al sia aktivega laboro la bulgara E-movado havas grandan internacian aŭtoritaton. La bulgaraj esp-istoj diskonigas vaste en eksterlando la kulturon, la revolucionan historion kaj la atingojn de la bulgara popolo en la konstruaĵo de socialismo.

Aparte grandan kontribuon donas la bulgara E-movado en la batalo por paco sur la tero. Jam 15 jarojn la prezidanteco de MEM estas en Bulgario. Estas tutmonde konataj la E-eldonaĵoj en Bulgario — la organoj de MEM „Paco“ kaj „Pacaktivulo“.

MEM-delegitaroj konstante partoprenas en internaciaj kaj naciaj pacforumoj. Precipe grava estas la partopreno de MEM-delegitaro en la Tutmonda Kongreso de la Pacamaj Fortoj, kiu okazis en Moskvo (1973). Tio estis uruafoje en la historio de la E-movado. Nun MEM-anoj aktive partoprenas la kampanjon por kolektado de subskriboj sub la rova Stokholma Apelo pri senarmigo.

MEM esprimas profundan dankon al la Registaro de Popola Respubliko Bulgario pro la malavara subteno de ĝia agado, dankon al la bulgaraj esp-istoj, al la Bulgara E-Asocio!

doc. BORIS KAMEŠKOV

*gvidanto de la soveta
delegitaro, doktoro de
historiaj sciencoj*

Permesu elkore saluti la kongreson en la nomo de la Unuiĝo de Sovetiaj Societoj por Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Aliaj Landoj kaj en la nomo de ĉiuj sovetaj esperantistoj. La 39-a kongreso de BEA kunvenas en historiaj kondiĉoj. Plue potenciĝas la fortoj de la paco, progreso kaj socialismo. Antaŭ ne longe finis sian laboron la Berlina Konferenco de 29 komunistaj kaj laboristaj partioj. Ĝi akceptis gravan dokumenton pri la batalo por paco, sekureco, kunlaborado kaj socia progreso. Ege influis la disvolvono de la E-movado en Bulgario kaj en la ceteraj socialismaj landoj la historiaj kongresoj de niaj komunistaj partioj kaj la gravegaj paroladoj de kamaradoj Breĵnev kaj Ĵivkov en tiuj kongresoj.

La bulgara kaj soveta popoloj estas popoloj-

fratoj. Same inter la sovetaj kaj bulgaraj esperantistoj ĉiam ekzistas vere frataj inter rilatoj kaj nedisigebla amikeco. La ĉefa celo de la bulgaraj kaj sovetaj esperantistoj estas la batalo por paco kaj socia progreso. En la XXV partia kongreso k-ĉo Breĵnev diris, ke la paco estas grandega boro por ĉiuj popoloj kaj grava kondiĉo por la progreso de la nuntempa homaro. Vi scias, ke la XXIV kongreso de la Komunista Partio de Sovetunio formulis programon de la paco, kiu estis sukcese realigita. La XXV kongreso de la sovetaj komunistoj akceptis programon por plua batalo por paco kaj internacia sekureco, por libero kaj suvereneco de la popoloj.

Reprezentantoj de sovetlandaj kaj bulgaraj esperantistoj aktive partoprenas mondajn forumojn de pacbatalantoj. Kune kun la popoloj de niaj ambaŭ landoj la bulgaraj kaj la sovetaj esperantistoj en la nunaj tagoj subskribas la rovan S'okholman Apelon por ĉesigo de la armilara konkuro, por senarmigo. Ili aktive laboras por realigo de la Programo de Helsinki.

Laŭdindaj estas la ĉiufankaj grandaj sukcesoj de BEA.

MEM-anoj estas dankaj al la bulgaraj esperantistoj-pacamantoj pro la regula aperigado de revuo „Paco“. La E-Komisiono de la Unuiĝo de la Sovetaj Societoj por Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Aliaj Landoj ankaŭ faras multon por aktivigo de la Esperntlingva eldonaĵo. En Sovetunio nun estas preparataj por eldono numeroj de la gazetoj „Paco“ kaj „Por la Paco“, dediĉitaj al la XXV kongreso de KPSU. En nia lando komercis regule aperi esperantlingvaj sciencesploraĵoj el serio pri la interlingvistiko.

Ni esperas, ke la 39-a kongreso de BEA donos rovan impulson al plua firmigo de la amikeco inter la soveta kaj la bulgaraj esperantistoj, inter la soveta kaj la bulgara popoloj.

RUDI GRAETZ (GREC)

prezidanto de Centra Laborrondo de GDR

La bulgara E-movado karakteriziĝas per sia profunda internaciismo. Ĝi konstante donas gravan kontribuon por fortikigo de la rilatoj de amikeco kaj frata kunlaboro inter la E-movadoj en la socialismaj landoj kaj en la tuta mondo.

La E-movado en GDR daŭre kreskas. Ni staras antaŭ nia landa kongreso en novembro ĉi-jare en Leipzig (Lajpcig).

Post la „Nuda inter lupoj“ nun ni preparas la eldonon de „Trigroŝa romano“ de Berthold Brecht.

Grava, ĝojiga evento: en la Universitato de Berlin kaj la Akademio de Sciencoj grandan intereson vekis la plensukcesa defendo de doktoriga disertacio pri Esperanto fare de Detlev Blanke — sekretario de la Centra Laborrondo. Tio estas la unua tiaspeca doktoriĝo en GDR kaj tria en monda skalo.

Al la 63-a UK de Esperanto en Varna venos kelkaj centoj da esp-istoj el GDR.

DRAHOMIR KOČVARA

estrarano de Ĉeĥa E-Asocio

Mi salutas vian 39-an kongreson en la nomo de Ĉeĥa E-Asocio. En la pitoreska urbo Ruse mi estas duan fojon. Mi traveturis ĝin en 1963, kiam mi vizitis la neforgeseblan UEA-kongreson en Sofia. Tiam Ruse estis modesta urbo, sen altaj konstruaĵoj. Hodiaŭ mi ne povas rekonigi ĝin. Vico da modernaj konstruaĵoj kaj luksa hotelo „Riga“ montras, kian grandan paŝon faris via lando en la konstruado de la socialismo. La frata kunlaborado kun USSR kaj la ceteraj socialismaj landoj kontribuis por la evoluo de via bela lando, helpis ĝin fari grandiozan paŝon antaŭen.

En Ĉeĥoslovakio ni jam delonge alkutimiĝis, ke ne nur legomoj kaj fruktoj — tiuj tradiciaj bulgaraj varoj — aperas en nia merkato, sed ankaŭ bulgaraj bormaŝinoj, transportiloj, levmaŝinoj, elektronaj kalkuliloj, akumulatoj ktp.

Mi ĝojas, ke ankaŭ nia ŝatata lingvo Esperanto ludas rolon en la kompreniĝo kaj la fratiĝo inter Ĉeĥoslovakio kaj Bulgario. Mi ĝojas, ke Esperanto vaste informas la tutan mondon pri la atingitaj sukcesoj. Mi nur bedaŭras, ke ne ĝisvivis la grandiozan evoluon la bulgara plej granda revoluciulo Georgi Dimitrov. En ĈSSR lia heroo batalo kontraŭ la faŝismo estas alte admirata. Multaj fabrikoj kaj stratoj portas kiel eternan rememoron la nomon de G. Dimitrov.

Ni kun ĝojo konstatas, ke Esperanto fariĝis dum la lastaj jaroj grava fenomeno sur la kampo de la pacbatalo. Ni devas alte aprezi la bulgaran E-movadon, ĉar en tiu sfero ĝi ludas ĉefan rolon en la mondo. Ni admiras la persistan laboron de la bulgaraj esperantistoj sur la kampo de la pacbatalo. Ĉi tie nia ŝatata lingvo estas en rolo plej grava, ĉar ĝi helpas defendi la atingitajn sukcesojn kontraŭ la militdetruo. D-ro Zamenhof estis inspirita de pacaj ideoj, kiam li aŭtoris Esperanton. Do ni, esperantistoj, heredis de li la devon uzi Esperanton en la batalo por monda paco.

Mi dankas al vi pro la zorgemo al ni. Mi havas senton, ke mi estas ne en eksterlando, sed hejme — inter amikoj, inter familianoj.

Mi promesas al la Bulgara E-Asocio helpi en via grava tasko — organizi bonege la 63-an UK de Esperanto. Ni jam hodiaŭ komencos propagandi ĝin kaj ni kredas, ke partoprenos almenaŭ 500 kongresanoj el ĈSSR.

Vivu la amikeco inter la bulgaraj kaj la ĉeĥoslovakaj esperantistoj, inter la bulgara kaj la ĉeĥoslovakaj popoloj!

EUGENO MOLNAR

vicprezidanto de la Hungara E-Asocio

Mi havas trioblan motivon nomi vin fratoj de la hungaroj.

Unue, dum sia samsorta kaj peza historio ambaŭ niaj nacioj suferis longatempe sub fremda, turka jugo. Rondcifere cent kvindek jarojn, sed vi trioble, nome kvincent jarojn, devis toleri la amaran sorton de la subpremitoj.

Due, starante sur identa ideologia bazo, ni same klopodas realigi tian homan socion, kie, en plej strikta senco de la vorto, vere la plej ĉefa valoro estos kaj restos la homo.

Trie, ni estas ja ĉiuj esperantistoj de bonvolo, kiuj uzas la internacian lingvon Esperanto en la spirito de ĝia genia kreinto d-ro Ludoviko Zamenhof, en intereso de la daŭra paco kaj kiel rimedon por certigi kunvivadon inter la diverslingvaj popoloj de la tuta terglobo.

Jen kiom da fadenoj kunligas niajn popolojn. Ne estas mirinde, do, ke ni kun ĝojo akceptis la afablan inviton de la Bulgara Esperantista Asocio partopreni en via nacia kongreso.

Komisiite de la Hungara Esperanto-Asocio kaj kiel ĝia vicprezidanto, mi transdonas al vi la varmajn salutojn de la hungaraj esperantistoj, dezirante al via tutlanda kongreso rezultoplenan laboron kaj multe da sukcesoj.

Vivu nia fruktodona amikeco!

Salutparoladojn al la Kongreso faris ankaŭ:

STANISLAV ŜVISTAK — en la nomo de UEA,
KETI MELISOPULU — Grekujo,
MOMČILO KRSTIĆ — Jugoslavio,
STANISLAV ŜVISTAK — Pollando,
JON BUNEA BUNESCU — Rumanio,
FRANTIŠEK ŠATURA — Slovakio,
KARLO NIKOLIDI — Svisujo,
AHMET ASKER — Turkujo,



Radoslav Tričkov — *Vraca* : Rakontis pri la varia laboro de la junaj esperantistoj en Vraca kaj aparte pri ties agado kune kun la junulara domo, kie ili havas je dispono konstantan apartan ejon. Li rekomendas tiun komunan agadon. Proponas en Vraca postkongreson en 1978.

Vasil Hinev — *Pleven* : Notis bonajn sukcesojn de Esperanto en la lernejoj de la urbo, plimultigon de la membraro.

Petko Arnaudov — *Pazarĝik* : Raportis pri gravaj atingoj de la esperantistoj en la urbo : propra E-klubejo, sukcesoj en la lernejoj k. a.

Jordan Jordanov — *Smoljan* : Rakontis pri la multnombraj sukcesoj de la esperantistoj en Rodopi-montaro. La distrikta E-organizaĵo en Smoljan kune kun la polaj amikoj organizis la unuajn en la mondo avian kaj aŭtobusan E-liniojn inter Bulgario kaj Pollando. Grave plibonigis la kondiĉoj de la E-instrubazo en Pisanica. En la distrikto aktive laboras 15 E-societoj. Proksime de Smoljan, en v. Pisanica, komenciĝis la konstruado de la unua en la mondo kvinetaĝa Internacia E-lernejo. La unua etaĝo jam estas konstruita. Tio estas historia atingo de la Bulgara E-movado. Antaŭstaras ankoraŭ unu granda entrepreno : konstruado de la unua en nia lando distrikta E-domo en Smoljan kun utila areo de 600 m².

J. Jordanov proponis : la centra E-domo en Sofio estu nepre konstruita kune kun BEK ; BEK apartiĝu de la Kooperativa Unuiĝo kaj fariĝu memstara ekonomia unuo de BEA ; ĉe BEK oni kreu fakon de E-turismo ; oni plialtigu la membrokotizon je 2 levoj, same la abonkotizon ; oni komencu eldonadon de bulgarlingva periodaĵo „Globus“ por propagando de Esperanto en la neesperantistaj medioj ; por la 40-a kongreso de BEA la E-membraro en Smoljan atingu 1000, la asocia membraro — 10 000. Proponis, ke la 40-a kongreso de BEA okazu en Smoljan.

Kaljo Bjandov — *Burgas* : Parolis pri aktivigo de la E-vivo en la distrikto. Plivigliĝis la agado de „Nigra Maro“ en Burgas, de la E-societoj en Pomorie kaj Karnobat, estis fondita nova societo — en la ĉarma ripozloko „Slânčev Brjag“ (Suna Bordo). Oni aparte atentis pri la E-agado inter la jurularo. DK helpas la laboron de la Internaciaj E-Kursoj por Instruistoj en kv. Meden Rudnik.

Proponis : CE de BEA turnu pli grandan atenton al E-turismo, klopodu por pli riĉa eldonado de instru-kaj belarta literaturo, plimultigu la paĝojn kaj pligrandigu la formaton de nia organo „Bulgara Esperantisto“, iniciatu organizon de internacia E-eldonejo por la socialismaj landoj ka.

Georgi Dolapčiev — *Sofio* : Rimarkigis ke lastatempe nia E-propagando malfortiĝis : nesufuĉaj estas niaj publikaj kunvenoj, afiŝado, disaŭdigoj pere de la lokaj radioretoj, kontak-

toj kun entreprenoj, oficejoj, institutoj, kon- taktoj kun la ceteraj amasaj organizoj, aparte kun Komsomolo, Sindikatoj, Patrolanda Fronto. Apelaciis al aktiva helpo de ĉiuj distriktaĵ kaj societaĵ estraroj al la iniciatoj de la instruista Sekcio de BEA kaj de la Sofia Distrikta Estraro por disvastigo de Esperanto inter la instruistaro : la tutjaraj korespondaj kursoj, la 20-tagaĵ Internaciaj Kursoj por Instruistoj en Burgas, la semajnaj vintraĵ kaj printempaj kursoj. Ĉiuj ĉi aranĝoj havas nuran gravegan taskon : prepari E-instruistojn por la tuta lando, helpas pri la samo ankaŭ al eksterlando. Apelon pri helpo Dolapčiev direktis ankaŭ lige kun la E-tendaro por lernantoj en Druŝevo, kie sinsekve dum ĉiu somero povas ripozi kaj daŭre perfektigi sin en la lingvo centoj da junaj homoj.

Plue li parolis pri la akra neceso aktivigi la E-sekciojn, rakontis pri la utila laboro de la organizita fare de la Sofia DK de BEA multobliga ofseta-stencila bazo kaj emfazis la grandan bezonon, ke la Centra Estraro faru ĉion eblan por certigi sufiĉe da lernolibroj, vortaroj kaj aliaj instruhelpiloj.

Dimo Trudoljubov — *Jambol* : Atentigis pri la neceso plibonigi kaj variigi la enhavon de la asocia organo „Bulgara Esperantisto“, plibonigi ĝian poligrafian ellaboron.

Kanju Kanev — *u. Gâlâbovo, distrikto de Stara Zagora* : Raportis pri vigliĝo de la E-movado en la distrikto — estis fonditaj 3 novaj E-societoj (u. Gâlâbovo, la kemia kombinumo, la dramteatro „Geo Milev“) kun 115 membroj kaj restarigitaj la societoj en v. Dâlboki, Pavel Banja, Gabarevo kun 107 membroj. Entute en la distrikto nun aktivas 12 E-societoj kun 569 membroj. Antaŭstaras fondaĵo de societoj en v. Radnevo kaj v. Enina. Plej grandaj malfacilaĵoj : manko de lernolibroj, vortaroj ks, manko de bonaj instruistoj. Fine Kanev proponis, ke la 40-a kongreso de BEA okazu en Stara Zagora.

Georgi Dimov — *Varna* : Kategorie subtenis la proponon pri altigo de la membro- kaj abonkotizoj. Rakontis pri la stato de Esperanto en la distrikto. En 1975 j. tie estis 4 E-societoj kun 113 membroj, nun, en 1976 — jam 15 societoj kun 390 membroj. La tasko : ĝis la fino de 1977 atingi 500 membrojn. Estas fonditaj unuafoje E-societoj en kelkaj vilaĝoj de la distrikto.

Fani Miĥajlova — *Plovdiv* : Rakontis pri la E-movado en la distrikto. Invitis la 40-an kongreson de BEA en Plovdiv.

Vasil Bozarov — *Sofio*, prezidanto de la Instruista Sekcio de BEA : Atentigis pri la graveco de la E-laboro inter la instruistoj kaj pri la kreita jam sistemo de preparo de E-instruistoj — forestaj (korespondaj) kursoj dum la lerrojaro, someraj 20-tagaĵ internaciaj E-kursoj por instruistoj en Burgas, semajnaj E-kursoj dum la vintraĵ kaj printempaj feri o

Ju pli granda estus la helpo de la distriktoj kaj societaj estraroj al tiuj ĉi aranĝoj, ju pli multe da bonaj, kapablaj kaj perspektivoriĉaj instruistoj tiuj estraroj direktas al ili, des pli multajn kaj bone preparitajn — lingve kaj metodike — E-instruistojn kaj kursgvidantojn ili havos. Pere de tiuj aranĝoj oni enverŝos freŝan junan sangon en nian E-movadon.

Atanas Bojaĝiev — *Ŝumen*: Unu el la grandaj historisignifaj eventoj en la mondo dum la periodo post nia lasta kongreso ĝis nun estis la glora venko de la vjetnama popolo super la usona agreso. Nun tiu heroo nobla popolo estas libera, ĝia lando — sendependa, unuigita socialisma respubliko. DK de BEA en Ŝumen ricevis dankleteron de la Vjetnama Pacdefenda E-Asocio (VPEA) pro la konstanta helpo, kiun ĝi donis al la vjetnama popolo en ĝia malegala, sed justa batalo.

En Ŝumen-distrikto antaŭ la 38-a kongreso de BEA estis nur 3 E-societoj, nun estas 8, do estis fonditaj 5 novaj: en u. Preslav 3 — dank' al la fervora agado de s-anino Rajna Stanĉeva, en la Supera Pedagogia Instituto de Ŝumen unu kaj unu en la plej nova urbo Vârbica.

Bojaĝiev parolis pri la bona laboro de E-Societo „Vekiĝo“ en Ŝumen kun la aliaj organizaĵoj kaj komitatoj en la urbo — la Patrolanda Fronto, la pacdefenda komitato, la komitato de la bulgara-soveta amikeco ka. „Vekiĝo“ bone organizis kolektivajn kaj individuan internacian korespondadon, havas regulajn ĉiusemajnajn kunvenojn, organizas E-kursojn.

Li insistas, ke nia Asocio kaj BEK organizu bonan eldonadon de lernolibroj, vortaroj, beletra literaturo, albumoj, bildkartoj kaj memordonacoj kun E-surskriboj.

Opinias, ke la plej bona loko por nia 40-a E-kongreso estas Ŝumen — lige kun la antaŭtaranta tutpopola celebrego de 1300-jariĝo de

la bulgara ŝtato, kies unuaj ĉefurboj estis en la distrikto de Ŝumen.

Genĉo Genĉev — *Sofio*: prezidanto de la jurista E-sekcio „Justeco“: Priskribis la agadon de la sekcio, kiu estas relative juna, tamen jam atingis notindajn sukcesojn — en ĝi membras 130 juĝistoj, jurkonsilistoj, advokatoj ka. La sekcio sisteme zorgas pri popularigo de nia socialisma juro en eksterlando pere de prelegoj enkadre de la universalaj kongresoj de Esp-to, per aperigo de artikoloj en „Internacia Jura Revuo“, per tradukado de normigaj aktoj de la bulgara juro, per preparo de E-vortaroj por juristoj-esperantistoj, per aktiva kolektiva kaj individua korespondado ka.

Asen Matev — *Lovĉ*: Rakontis pri la E-agado en tiu revolucia distrikto, el kiu 15 geesperantistoj heroe pereis en la kontraŭfaŝisma batalo. Kreskis la nombro de la membraro, de la abonantoj al nia asocia organo. Bonaj rezultoj donis la organizitajn dum la lastaj tri jaroj interdistriktaĵoj E-renkontiĝoj: en v. Borima (dediĉita al la bulgara revolucia poezio kaj kantoj), en la turista loko „Beklemeto“ (dediĉe al la Internacia Jaro de la Virino kaj la XI-a kongreso de BKP), en urbo Trojan (dediĉita al la glora Aprila Ribelo de nia popolo kontraŭ la otomana jugo). Ĉe tiuj renkontiĝoj oni aŭskultis prelegojn, belartajn programojn el recitaĵoj, kantoj, folkloraj dancoj ka., amuziĝis.

Ivan Keremidĉiev — *Sofio*: Akcentis la neceson, ke la bonaj gvidantoj ĉiam kreu aktivularon ĉirkaŭ si, heredantojn. Tiam eĉ se bona gvidanto forlasus la loĝlokon, la E-afero ne estigiĝus.

Rakontis pri la diversflanka agado de la Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“. Aparte notindaj estas ĝiaj regulaj ĉiusemajnaj kunvenoj kun tre varia programo.

LA REZOLUCIO

de la 39-a Kongreso de la Bulgara Esperantista Asocio

La laboro de la 39-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj okazas en rimarkinda enlanda kaj internacia atmosfero, ekskluzive favora por la agado de ĉiuj progresemaj, demokratiaj kaj pacamaj organizoj kaj movadoj.

Nia popolo senŝancelle plukonstruas la socialismon. Dum la Sesa Jarkvino estis farita nova grandega paŝo antaŭen por realigo de l'akceptita de la X-a Kongreso de BKP programo de konstruado de matura socialisma socio en PR

Bulgario. La plenumo de la taskoj de la Sempa Jarkvino levos al nova ankorau pli alta nivelo la totalan soci-ekonomian kaj kulturan evoluon de nia patrolando laŭ la markita ĉefvojo.

La devizo „Alta efikeco kaj alta kvalito!“, levita de la XI-a Kongreso de BKP, stimulos la laboron de la bulgaraj esperantistoj por ankoraŭ pli energia kaj profunda popularigo de la sukcesoj de la bulgara popolo en la socialisma konstruado kaj de la pacama

politiko de PR Bulgario, kiu helpas por la transformo de la Balkana Duoninsulo kaj Eŭropo en zonan de paco, bona najbareco, sekureco kaj kunlaborado inter ĉiuj ŝtatoj, sen diferenco de ilia sociekonomia ordo.

En la internacia situacio estas forte esprimita la tendenco al malstreĉiĝo kaj plua fortikiĝo de la sekureco de la ŝtatoj laŭ la principoj, akceptitaj unuanime de la Eŭropa Konferenco en Helsinki 1975. Nun la ĉefa tasko de la pacama socio en la mondo estas labori decide por malpliigo de la konkuro en la armado kaj por malarmado, por ke la malstreĉiĝo estiĝu nereturnebla procezo.

La Kongreso esprimas la varman deziron de la bulgara esperantistaro helpi per ĉiuj specifaj rimedoj kaj laborformoj de nia Movado por plua progreso de la patrolando sub la humana devizo «Ĉio por la homo, ĉio por la bono de la popolo!» kaj ankaŭ por realigo en la internacia vivo de la principoj, kuŝantaj en la Konkluda Akto, akceptita en Helsinki.

*

Dum la ĵuspasinta periodo la Bulgara Esperantista Asocio realigis la decidojn de la 38-a Kongreso (Smoljan, 1972) kaj atingis novajn sukcesojn en sia ĉiuflanka agado.

En organiza rilato la Asocio stabiligis kaj pligrandigis la nombron de siaj membroj kaj de la Esperanto-societoj en urboj kaj vilaĝoj. La mezaj gvidantaroj — la distriktaj komitatoj — manifestis pli grandan kapablon plenumi siajn taskojn kaj organizi ne nur distriktajn, sed ankaŭ interdistriktajn kaj regionajn aranĝojn. Vico da asociaj sekcioj disvolvis aktivan agadon.

Per multnombraj kursoj por studo de Esperanto kreigis nova generacio de esperantistoj, parto de kiuj aliĝis al la vicoj de niaj societoj kaj kontribuis por la vastigo de la bazo de l'organizita Esperanto-movado. Konstantiĝis novaj utilaj formoj de laboro kun la esperantista junularo kaj kreigis bonaj

kontaktoj kun la junularaj domoj de DKMS en vico da distriktaj centroj.

La kultura kaj instrua laboro realiĝis sur pli alta nivelo kaj estis pli varia. Rezulte de tio intensiĝis la publika aktiveco de la organizitaj esperantistoj kaj boniĝis ilia kuna laboro kun la Patrolanda Fronto kaj aliaj publikaj organizoj. Ankoraŭ pli bone stabiligis nia kunlaboro kaj amikeco kun la sovetaj esperantistoj en la spirito de la nerompebla bulgara-soveta amikeco.

En la internacia agado estis daŭrigita la linio de aktiva partopreno en la vivo de la monda Esperanto-movado. La aŭtoritato de la bulgaraj esperantistoj sur la internacia kampo estis fortigita ankoraŭ pli. Kreskis la respekto al la bulgaraj esperantistoj ankaŭ en la rondoj de la Mondpaca Esperanto-Movado (MEM), kies prezidanteco dum 13 jaroj troviĝas en nia lando. Jam trian jaron la oficiala organo de MEM, la revuo „Paco“, aperas en Bulgario kaj estas akceptata tre bone de la legantoj en ĉiuj aliaj landoj. Per la materiala kaj morala subteno de BEA kaj de la Bulgara Komitato de MEM, en Ruse okazos tuj post nia Kongreso la Sepa Ĝenerala Konferenco de MEM. Kun intereso oni renkontas la aperon de la Esperanto-emisio de revuo „Scienca Mondo“, organo de la Mondfederacio de la Sciencistoj, kiu ĝis nun aperis en kvar lingvoj: franca, rusa, angla kaj germana. La Esperanto-eldono aperos en Bulgario kaj levos ankoraŭ pli la renommon kaj la prestiĝon de la bulgara Esperanto-movado. Konsiderinde stabiligis la internaciaj laborbrigadoj de junaj esperantistoj, organizataj ĉe ni de la Bulgara E-Junularo. Bonan famon ricevis la Internaciaj Kursoj por Instruistoj de Esperanto en Burgas kaj la E-kursoj en la Internacia Kursejo apud Smoljan, kiu dum la kuranta jaro komencis la konstruadon de propra moderna domo — instrukombinon.

Konsiderante tiujn ĉi kaj aliajn sukcesojn, montritajn en la raporto kaj



notitajn en la eldiroj de la delegitoj, la Kongreso atentigas pri la neceso vastigi kaj fortikigi ilin kaj ankaŭ likvidi la seriozajn malfortaĵojn en la diversaj agadkampoj de la Asocio.

Elvokas maltrankviligon iuj organizaj malfortaĵoj, kiuj retenas la pli rapidan kreskon de la organizita Esperanto-movado: la nesufiĉa kvanto kaj la malforta organizo de la kursoj por novaj kaj aparte por progresintaj esperantistoj, la nesufiĉe alta lingva nivelo, la neregula eldonado de instruiloj, la mankoj en nia propaganda laboro ĉe la ne-esperantaj rimedoj por amasa informado, iuj preterlasoj en la internacia agado de la bulgaraj esperantistoj.

Por likvido de tiuj mankoj kaj malfortaĵoj en la estonta laboro de la Asocio kaj ĝiaj subdividoj, la Kongreso

DECIDAS:

1. Daŭrigi plej energie la klopodojn por stabiligo kaj vastigo de la reto de societoj, bonigante decide la ritmecon de la kotizpago kaj konsiderinde vigligante la interne organizan vivon — bazo de ĉiuj sukcesoj en la aliaj sferoj de la socia agado.

2. La distriktaj estraroj vastigu sian ĝisnunan agadon kaj ankoraŭ pli bone helpu unu la alian ĉe organizado de interdistriktaj kaj regionaj aranĝoj, kiun oni realigu sur alta organiza kaj idea niveloj. La kunagado kun la komitatoj de la Patrolanda Fronto kaj aliaj publikaj organizoj fariĝu konstanta laborformo.

3. La Buroo de la Centra Estraro de BEA plibonigu sian laborstilon, perfektigu la organizon de siaj kunidoj, forigante la troan ŝarĝitecon; ĝi certigu pli sisteman personan kontakton kun la distriktaj kaj sekciaj estraroj, riĉigante la formojn de helpado en la laboro de ĉiuj asociaj ĉeneroj kaj faciligante la konigon kaj la uzadon de la pozitivaj spertoj enties agado.

4. La varbadon kaj retenadon de junaj esperantistoj oni rigardu kiel

ekskluzive gravan taskon, kies plenumo garantias la normalan evoluon de la Asocio kaj ĝian estontecon kaj konservas la necesan kontinuecon inter la generacioj en la Esperanto-movado.

Oni ankoraŭ pli bone kunordigu la laboron de la Junulara Sekcio de BEA kun la komitatoj de la Komsomolo, interligante ĝin strikte kun la pli sencoplana kaj celdirekta pasigo de la libera tempo de la junularo por kulturaj okupoj kaj memklerigo.

5. La kursan laboron, kiel ĉefan formon de kreado de novaj esperantistoj, direkti antaŭ ĉio al la juna kaj meza ĝa generacioj por certigi sisteman junigon de la asociaj vicoj, kion oni atingis en la distrikto de Smoljan kaj en iuj aliaj distriktoj.

Levi sur modernan metodikan nivelon la kursojn de Esperanto, por certigi pli altkvalitan lingvan instruadon de la novaj esperantistoj. La atento de la distriktaj kaj societaj estraroj direktiĝu al pli amasa organizado de kursoj kaj aliaj instru-formoj por progresintaj esperantistoj, por ke ĉi tiuj perfektigu sian lingvan posedon — ĉefa rimedo por enhavoriĉa kaj efika komunikado kun alilandaj esperantistoj.

La distriktaj kaj la societaj estraroj klopodu pli energie kaj pli sisteme por altkvalita instruado de sufiĉa nombro de Esperanto-lektoroj, aparte atentante la instruistojn.

La distriktaj kaj la societaj estraroj montru pli da atento kaj zorgojn al la instruistoj-esperantistoj kiel plej grava faktoro por la disvastigo de Esperanto kaj fortigo de la lokaj Esperanto-societoj.

Ili prezentu ĉiuf flankan moralan kaj laŭ siaj ebloj materialan helpon al kapablaj kaj perspektivoriĉaj instruistaj kadroj.

6. La Centra Estraro daŭrigu la insistojn antaŭ la Ministerio de Popola Klerigo por plivastigo de la fakultativa kaj studronda instruado de Esperanto en la lernejoj. La Ministerio solvu la problemon pri la rekom-

penco de la gvidantoj de studrondoj.

7. La Buroo de CE faru ĉion eblan por eldono de altkvalitaj lernolibroj, vortaroj kaj aliaj instruhelpiloj, por subteni pli amasan organizadon de kursoj kaj pli efikan preparadon de esperantistaj kadroj.

Vastigi kaj direkti ĝuste la Esperanto-propagandon, proponante al la rimedoj por amasinformado enhavriĉajn materialojn pri la diversflanka konkreta soci-utila laboro, farata de la esperantistoj en la loĝlokoj kunlabore kun la Patrolanda Fronto kaj aliaj amasorganizoj.

Fari novajn, ankoraŭ pli insistajn provojn pri esperantlingva eldono de verkoj de nia artiliteraturo, libroj kaj broŝuroj pri nia historio, pri niaj naturaj, kulturaj kaj turismaj vidindaĵoj. Oni aperigu en bulgara lingvo broŝurojn pri la problemoj de la Internacia Lingvo.

8. Ankoraŭ pli energie daŭrigi la rekonstruon de la kulturamasa laboro, serĉante novajn formojn kaj variigante la ĝisnunajn.

9. Fortikigi kaj vastigi la amikecon kaj la kunlaboradon sur duflanka kaj plurflanka bazo kun la esperantistoj el Sovet-Unio kaj la ceteraj frataj socialismaj landoj.

Konigi al la esperantistoj en alilando la realajn atingiĝojn de Popola Respubliko Bulgario kaj stabiligi la amikajn kontaktojn kun ili.

Direkti la idean kaj edukan laboron al formiĝo de la esperantistoj kiel patriotoj kaj internaciistoj.

Gvidi el ĝustaj teoriaj pozicioj la praktikan aplikadon de la internacia lingvo Esperanto serve al la grandaj taskoj de la bulgara popolo en la batalo por paco, socia progreso, sekureco kaj kunlaborado en Eŭropo kaj la tuta mondo.

Daŭrigi kaj ankoraŭ pli aktivigi la partoprenon de BEA kaj ties sekcioj en la aktivado de la internacia Esperantomovado. Specialan atenton turni al

la plua bonigo de la laboro de MEM, al la kunlaboro kun la Esperanto-organizoj en la socialismaj landoj, al perfektigo de l' organizado de la internaciaj junularaj Esperanto-brigadoj ĉe ni.

Specialan atenton kaj zorgojn direkti al la laboroj prepare al brila organizo de la 63-a Universala Kongreso de Esperanto en 1978 en Varna.

10. Propagandi pli vaste la pozitivajn rezultojn de la internacia Esperanto-korespondado, montrante la atingojn kaj helpante por la forigo de la preterlasoj kaj la mankoj. Proponi por publikigo interesajn leterojn kaj organizi periodajn ekspoziciojn, angulojn, vitrinojn kun E-korespondaĵoj kaj aliaj interesaj materialoj.

Turni specialan atenton al evoluigo de la kontaktoj kun Esperanto-societoj kaj unuaj esperantistoj el ĝemelurboj kaj distriktoj.

11. La Buroo de CE, la sekciaj, distriktaĵaj kaj societaj estraroj ellaboru detalajn konkretajn programojn, kiuj antaŭvidu praktikajn aranĝojn por realigo de la kongresaj decidoj, por plua supreniro de la ĉiuflanka agado de BEA sub la devizo „Kvalito kaj efikeco — efikeco kaj kvalito!“

12. BEA klopodu por fortikigo de la Bulgara Esperantista Kooperativo, kiu kontribuas por la fortikigo de la Esperanto-movado en la lando.

*

La Kongreso esprimas sian firman konvinkon, ke la nove elektita Centra Estraro de la Bulgara Esperantista Asocio mobilizos la energion de ĉiuj asociaj ĉeneroj kaj unuaj membroj por la ĝustatempe kaj bonkvalita plenumo de ĉiuj starigitaj taskoj.

Al energia kaj fruktodona laboro por pluaj sukcesoj de la nobla Esperanto-afero!

Vivu nia kara Patrujo — Popola Respubliko Bulgario!



ЦЕНТРАЛНО РЪКОВОДСТВО, ИЗБРАНО ОТ 39 КОНГРЕС

- | | |
|--|---|
| 1. Ангел Христов Тодоров — София | 52. Кръстю Д. Петков — Каруцин — София |
| 2. Ангел Вълков Гяуров — Попово | 53. Кунчо Иванов Вълев — София |
| 3. Асен Ганчев Матев — Ловеч | 54. Люба Димитрова Бояджиева — София |
| 4. Атанас Илиев Гаев — Асеновград | 55. Манол Стоименов Чолев — Велинград |
| 5. Атанас Димитров Бояджиев — Шумен | 56. Мария Кожарева — Банско |
| 6. Асен Георгиев Григоров — София | 57. Марин Иванов Бъцев — София |
| 7. Белка Христова Белева — София | 58. Михаил Христов Данчев — Пловдив |
| 8. Белчо Димитров Варсев — Габрово | 59. Нано Вутов Нанов — София |
| 9. Божидар Стефанов Леонов — Карлово | 60. Нано Цанов Кючуков — София |
| 10. Борис Киров Горнишки — Кнежа | 61. Нено Стефанов Янев — Габрово |
| 11. проф. Васил Цолов Пеевски — София | 62. Ненко Йонков Ненков — София |
| 12. Васил Христов Бозаров — София | 63. Никола Богданов Алексиев — София |
| 13. Василка Антонова Цветкова — София | 64. Никола Пилев Милев — Хасково |
| 14. Васил Петров Марков — Ловеч | 65. Никола Русев Ганев — Карлово |
| 15. Венеци Георгиев Великов — Плевен | 66. Никола Атанасов Узунов — Хасково |
| 16. Веселина Христова Куртева — Пловдив | 67. Павел Велинов Еленов — Варна |
| 17. Виолин Цанев Олянов — София | 68. Пенка Какалчева — Силистра |
| 18. Владимир Тодоров Желев — Пловдив | 69. Петранка Петрова Петрова — Русе |
| 19. Вълка Данкова — Попово | 70. Петър Колев Ненов — Разград |
| 20. Георги Маринов Добрев — Русе | 71. Петър Ангелов Тодоров — София |
| 21. Георги Василев Каляшки — Кюстендил | 72. Петко Петров Арnaudов — Пазарджик |
| 22. Генчо Георгиев Генчев — София | 73. Райно Иванов Чипилев — Стара Загора |
| 23. Георги Манов Кашукеев — Кюстендил | 74. Радослав Кузманов Тричков — Враца |
| 24. Георги Идакиев Павлов — Хасково | 75. Росица Димитрова Джурова — Разград |
| 25. Георги Цветков Разсолков — Благоевград | 76. Серафим Стоянов Серафимов — Бургас |
| 26. Георги Христов Димов — Варна | 77. Симеон Делчев Симеонов — София |
| 27. Георги Цветков Иванов — Варна | 78. Стефан Петров Павлов — Смолян |
| 28. Георги Николов Долапчиев — София | 79. Стефан Ганев Попов — Русе |
| 29. Дамян Маринов Крушев — Толбухин | 80. Стефан Русев Станков — Търговище |
| 30. Димитър Костадинов Димов — Варна | 81. Спиридон Недялков — Перник |
| 31. Димитър Иванов Хаджиев — София | 82. Стойчо Тодоров Цанков — Русе |
| 32. Димитър Атанасов Мутушев — София | 83. Стоян Петров Костадинов — София |
| 33. Димитър Атанасов Христов — Ямбол | 84. проф. Стоян Стоев Джуджев — София |
| 34. Димитър Стоянов Папазов — София | 85. Стоян Горанов Морареску — София |
| 35. Друми Друмев Матеев — Разград | 86. Стоян Николов Танев — Пазарджик |
| 36. Еню Крумов Даскалов — Враца | 87. Снежинка Атанасова Ангелова — Враца |
| 37. Емил Симеонов Чирпански — Доспат | 88. София Иванова Сутрова — Русе |
| 38. Захари Минов Иванов — София | 89. Тодор Г. Петков — Толбухин |
| 39. Иван Дечев Дечев — Стара Загора | 90. Тодор Димитров — Велико Търново |
| 40. Иван Димитров Керемидчиев — София | 91. Христо Асенов Керелезов — Кърджали |
| 41. Иван Лишев Тодоров — Троян | 92. Христо Василев Долчинков — В. Търново |
| 42. Игнат Николов Игнатов — Видин | 93. Христо Маринов Горов — София |
| 43. Илия Маринов Илиев — Кубрат | 94. Фани Милева Михайлова — Пловдив |
| 44. Илия Иванов Илиев — Ловеч | 95. Цветана Й. Зарева — Перник |
| 45. Йордан Михайлов Йорданов — Смолян | 96. Цветана Костова — София |
| 46. Йордан Йорданов Трифонов — В. Търново | 97. Цвятко Тодоров — Шумен |
| 47. Йордан Н. Йотов — София | 98. Цанко Петков Мургин — Шумен |
| 48. Йордан Димитров Ангелов — Садово | 99. Чудомир Михайлов Кантарджиев — Сливен |
| 49. Йордан Доксимов Чольовски — София | 100. Щерю Кукушев Зафиров — Пещера |
| 50. Калю Митев Бяндов — Бургас | 101. Венелин Митев — София |
| 51. Каню Митев Канев — Гълъбово | |

ЦЕНТРАЛНА КОНТРОЛНА КОМИСИЯ

- | | |
|-----------------------------------|-------------------------------------|
| 1. Богдана Иванова Попова — София | 5. Никола Стефанов Вангелов — София |
| 2. Борис Величков Попов — София | 6. Сребро Петров — София |
| 3. Любен Грозданов — София | 7. Христо Канев Иванов — София |
| 4. Моис Бенвенисти — София | |

Abonu la asocian organon „Bulgara Esperantisto“ nur pere de la poŝto ĝis la 30 de novembro! Alimaniere abono ne eblas. Abonkotizo por Bulgario 2 levoj. Ĉiu esperantisto — abonanto!



HONORAJ MEMBROJ DE BEA

Konekse kun art. 8 de la Statuto de BEA pro tre gravaj meritoj al la Bulgara Esperanto-movado la Kongreso proklamis kiel honorajn membrojn:

- | | |
|-------------------------------------|---------------------------------|
| 1. Atanas Dančev Atanasov — Sofio | 8. Stefan Minkov — Sofio |
| 2. Asen Georgiev Grigorov — Sofio | 9. Penko Petrov — Sofio |
| 3. Ivan Bonev Sarafov — Sofio | 10. Radoslav K. Tričkov — Vraca |
| 4. Prof. Stojan Stoev Ĝuĝev — Sofio | 11. Dinko K. Ŝiŝkov — Pârvomaj |
| 5. Zora Mladenova Hans — Varna | 12. Ivan K. Vasilev — Pazarĝik |
| 6. Tinka Todorova Lakova — Sofio | 13. Simeon Petrov — Kârĝali |
| 7. Trajana Spasova Petkova — Sofio | 14. Meleŝko Ŝiŝkov — Sofio |

TELEGRAMOJ DE LA 39-a KONGRESO

AL LA ESTRARO DE
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
ROTTERDAM — NEDERLANDO

Estimataj,

La impona milnombra 39-a Kongreso de la Bulgara Esperantista Asocio okazinta en la belega ĉedanuba urbo Ruse de la 10-a ĝis la 12-a de julio 1976, salutas Vin plej sincere.

Notinte la grandajn sukcesojn de la internacia lingvo Esperanto en nia lando, la bulgaraj esperantistoj akceptis en sia kongreso vastan programon por estonta agado, programon por novaj venkoj de la bulgara esperantista movado.

La kongreso certigas Vin, ke la bulgaraj esperantistoj ĉiam donos sian kontribuon por la multiĝo kaj la fortiĝo de la vicoj de UEA, por nova svingo de la nobla Esperanto-movado en ĉiuj landoj, en ĉiuj kontinentoj!

Vivu la internacia lingvo Esperanto — por paco, amikeco kaj kunlaborado inter la popoloj!

De la Kongreso de BEA

ЧРЕЗ ПОСОЛСТВОТО НА СЪЮЗА НА СЪВЕТСКИТЕ
СОЦИАЛИСТИЧЕСКИ РЕПУБЛИКИ В БЪЛГАРИЯ
ДО КОСМОНАВТИТЕ БОРИС ВОЛИНОВ И ВИТАЛИЙ
ЖОЛОбОВ

Скъпи другари космонавти,

Тридесет и деветият конгрес на българските есперантисти заседава в гр. Русе през дните, когато съветската орбитална станция „Салют 5“ извършва успешно своя полет около нашата планета.

Ние най-сърдечно приветствуваме вас, смелите съветски космонавти, и новия подвиг на съветската наука и техника и ви пожелаваме успешно завършване на набелязаната програма, насочена към овладяването на Космоса и служеща за благо на миролюбивото човечество, на общо-човешкото щастие и прогрес.

Пожелаваме ви щастливо завръщане на родна съветска земя!

ОТ КОНГРЕСА



Др. Станев,

Тридесет и деветият конгрес на българските есперантисти, състоял се от 10 до 12 юли т. г. в гр. Русе, Ви изпраща най-сърдечни поздрави.

Изказвайки благодарността на българските есперантисти за помощта, която Министерството на народната просвета оказва за разпространението на международния език есперанто в българските училища, ние изразяваме надежда, че тази помощ няма да ни бъде отказвана и занаяпред. Есперанто е ефикасно средство за патриотичното и интернационалното възпитание на младото поколение. Той активно допринася да се формира в него прогресивен мироглед, да се насаждат принципите на хуманизма, идеите за мир и дружба между народите. Есперанто е действителен фактор за повишаване на общокултурното и езиковото равнище на учащите се.

Много бихме се радвали, ако факултативното и кръжочното изучаване на международния език в българските училища повече се насърчава и подпомага от МНП.

ОТ КОНГРЕСА

LA 39-a EN LA GAZETARO, RADIO KAJ TELEVIDO

La 39-a Kongreso de BEA en Ruse vekis viglan interesigon en la centra kaj loka gazetaro. En la gazetara konferenco, okazinta la 9-an de julio en la Domo de la Kulturagantoj, partoprenis 10 lokaj ĵurnalistoj kaj korespondantoj de la centra gazetaro, de la radio kaj la televido.

En la plej disvastigita ĵurnalo en nia lando «**Rabotničesko Delo**» (850 000 ekz.) aperis prikongresaj materialoj en 5 sinsekvaj numeroj: la 10-an de julio — informo pri la gazetara konferenco; la 11-an — granda artikolo de Nikola Aleksiev kun titolo «**Patriotoj kaj internaciistoj — aktivaj batalantoj por la paco**» kaj subtitolo «**Hodiaŭ malfermiĝas la kongreso de la bulgaraj esperantistoj**»; la 12-an — detala informo pri la inaŭguro de la kongreso kaj ĝia laboro; la 13-an — informo pri la fermo de la kongreso kaj elekto de asociaj gvidorganoj; la 14-an — informo pri la Sepa Ĝenerala Konferenco de MEM.

La loka ĉiutaga ĵurnalo «**Dunavska Pravda**» ankaŭ dediĉis sufiĉan spacon al la kongreso. Jam la 6-an de julio ĝi aperigis detalan artikolon de la elstara loka esperantisto Georgi Bojkov pri la E-movado ĝenerale; la 7-an — artikolon «**La kontraŭfaŝisma laborista movado en Bulgario**» de Jordan Dimitrov (Kalinov); la 10-an — ampleksan artikolon de Nikola Aleksiev «**La esperantistoj en la batalo por la paco**» kaj detalan informon pri la gazetara konferenco de Ivan Harizanov; la 11-an — detalan informon de la sama ĵurnalista pri la antaŭkongresaj eventoj: plenkunsido de CK de BEA, la alveno de eksterlandaj gastoj, inaŭguro de la ekspozicio «**Esp-o en servo de la paco**

kaj internacia amikeco», pri la brila interkora vespero. Ĉar lunde la ĵurnalo ne aperas, la mardon (13-an de julio) ĝi aperigis grandspacan informon pri la inaŭguro de la kongreso kun foto, alian detalan informon pri la dua tago de la kongreso, pri la unua Plenkunsido de la Centra Estraro de BEA kaj la konsisto de ĝia novelektita Buroo; la 14-an — detalan informon pri la Sepa Ĝenerala konferenco de MEM.

La loka gazeto «**7 tagoj**» aperigis la artikolon «**La esperantista movado en u. Ruse kaj la distrikto**» de Stefan Popov (5. VII) kaj «**Eblecoj por internaciaj kontaktoj pere de Esperanto**» de Georgi Bojkov (12. VII).

La centraj ĉiutagaj ĵurnaloj aperigis jenajn prikongresajn materialojn «**Oteĉestven Front**» (9. VII) — la artikolon «**La homo, kiu esperis**» de Ivan Severnjaŝki (pri d-ro L. L. Zamenhof); la 10-an — informo pri la inaŭgurota kongreso; «**Narodna Mladeŝ**» (12. VII) — Informo de Ivan Harizanov pri la inaŭguro de la kongreso; «**Trud**» (13. VII) — Informo pri la laboro de la kongreso.

En la semajna gazeto en germana lingvo «**Sofioter Nachrichten**» (8. VII) aperis artikolo «**La lingvo, kiu kunligas la homaron**» kun subtitolo «**Antaŭ la 39-a kongreso de la Bulgara Esperantista Asocio**».

Nin atingis sume 21 materialoj prikongresaj, aperintaj en la centra kaj loka gazetaro.

Radio Sofia kaj Radio Varna elsendis pli ol 10-foje prikongresajn novaĵojn. La televido ankaŭ prezentis prikongresajn bildojn.

Kr. Karucin



Tiuj bildaĵoj estis aranĝita en la ĥorkantista salono de la Ŝtata Muzikteatro «Stefan Makedonski» en Sofio. Ĝi estis interesa evento en la teatra vivo kaj samtempe granda surprizo por la plimulto de la teatranoj.



La membroj de ĉiuj artkolektoj kaj la personaro de la ceteraj helpoficoj estis forte impresitaj de la riĉa kaj altnivela ekspozicio: 76 bildoj el 11 eŭropaj landoj. Vera internacia panoramo kun karaktero de vojaĝpriskribo.

Aŭtoro de tiuj bildoj estis nia kolego Prodan Prodanov, artisto-ĥorkantisto en la Muzikteatro, arda esperantisto kaj E-verkisto.

La prezentita materialo posedas originalan stilon. Ĝia koloraro estas riĉa, intensa kaj sukplena. Freŝa kaj juneca, ĝi esprimas bonhumoron kaj viglan animstaton. El ĉiuj bildoj de Prodanov ŝprucas amo al la bela naturo. Tiu amo estas sincera, pura kaj fontas rekte el la koro.

La tekniko de la pentristo estas varia: akvarela, oleofarba, litografia, lignogravura, monotipia, plus pentraĵoj, realigitaj per tuĉo kaj neskafo. La lasta pentromaniero estas tre interesa, kun riĉaj ebloj.

Ok monotipiaj bildoj konigis al la spektantoj la ĉarmon de la antikva urboparto de Tallinn, Estona SSR. La aŭtorokaptistion, kion oni povus nomi simbole «la varmon de la nordo».

Sukcese, versimile kaj subtile estis esprimita la pariza atmosfero en alia bilda serio. La urba pejzaĝo estas malfacila pentroĝenro.

Rigardante la bildojn de Prodanov oni devas konfesi, ke li majstre regas tiun malfacilan ĝenron. Liaj talinaj kaj parizaj urbopejzaĝoj elokvente pravas tion.

La «svisa bildociklo» prezentis serion da belegaj pejzaĝoj. La aŭtoro ne estis fremda al iuj modernaj esprimrimedoj, sed li ne estas ekstremisto, kaj plej ordinara spektanto povas kompreni lin. «Grimsel», «Materchorn», «Morkote», «Schulss», «Schwendisee», «Grindewald» estas tipaj pejzaĝoj, kiuj malkovras kortuŝe mildan panoramon. «Altdorf — la monumento de Wilhelm Tell» estas respektoveka pro la personeco de la svisa nacia heroo. «La somerdomo de Marsel Eyer» per si mem aspektas senpretenda bildo. La plej interesa en ĝi estas la cirkonstanco, ke kune kun la svisa standardo flirtas la bulgara nacia flago. La familio Eyer havas meritojn pri la disvolviĝo de la pedagogio en nia lando. Louis Eyer, instruisto de gimnastiko en Lom, Ruse kaj Silistra, pereis kiel oficiro en la bulgara armeo. Li estis aŭtoro de la apologia verko «Pro Bulgario». En nia lando mortis ankaŭ liaj du filoj kaj filino. Liafilo, Marsel Eyer, daŭrigis la agadon de sia patro. Li verkis multajn artikolojn favore al Bulgario, kiu estas lia patrolando, ĉar li naskiĝis en Lom.

Prodanov kvazaŭ «eltranĉis» la belegajn lokojn de Svislando por montri ilin al la publiko. La svisa bildociklo pravas, ke li egalmajstre kapablas krei kaj urban, kaj pure naturan pejzaĝon.

La grafikista bilda ciklo malkovras novajn panoramojn en nigroblanko kaj novajn kapablojn de la aŭtoro uzi la rimedojn de la grafikistaj pentroteknikoj. Ĝi enkadrigas bildojn el ĈSSR, GDR, GFR, Pollando, Slovenio kaj Rumanio.

La greka bildociklo korigas la karakteron de la suda panoramo de la Balkana Duoninsulo. En ĝi abundas la bluo de la maro kaj de la ĉielo.

En la ekspozicio Prodanov montris ankaŭ akvarelojn el Sofio, Veliko Târnovo, Godeĉ, Varna, Cerecel, Balŝa k. a. En la hejmlandaj pejzaĝoj radias la lumo kaj la varmo de la Patrujo, kiun la aŭtoro portas ĉiam en sia koro.

La ekspozicio «Per Esperanto tra la mondo» sendube kontribuas por elformo de internacia etiko helpe de la estetika efiko. En nia teatro ĝi vekis intereson al Esperanto, la lingvo, kiun nia kolego uzis dum siaj veturadoj. Esperanto helpis al la vojaĝanta pentristo kontakti kun homoj el diversaj landoj sen scii iliajn nacilingvojn. La ekspozicio estis efika kaj senduba propagandilo de Esperanto.

Lili Petkova — violonistino en la Muzikteatro „Stefan Makedonski“.

LA MAJSTRO KUN ORAJ MANOJ

Por la nuntempaj homoj ne estas konservitaj la ĝustaj trajtoj de lia vizaĝo. La pentristoj restarigas la profilon de Kolju Fiĉeto proksimume, laŭ la nura fotografaĵo, farita antaŭ lia enterigo en urbo Târnovo en 1881 jaro.

La detaloj en la biografio de tiu vera talento, deveninta el la sinoj de la popolo, ne sukcesis ĝisvivi la neantaŭvidantajn samtempulojn. Post la morto de Fiĉeto restis en nia lando nur la kreaĵoj de lia originala menso kaj oraj manoj. Ili ankoraŭ staras kiel la plej bona monumento de la granda majstro: la ŝtonponto apud urbo Bjala (super rivero Jantra), en Târnovo — la Domo kun la Simieto, la urbestrejo kaj kelkaj preĝejoj, la konstruaĵoj de la monaĥejoj „Preobraĵenski“ apud Târnovo kaj „Sankta Ilija“ apud v. Rakovo, la kovrita ponto en Loveĉ, la ponto de rivero Rosica en Sevlievo, la preĝejo „Sv. Nikola“ en nrbo Drjanovo, la okmura fonto en la korto de la monaĥejo „Sokolski“ apud Gabrovo.

Oni ankaŭ nun admiras ilin kaj demandas sin, kiel dum la netrasidebla mallumo de la osmana jugo povis naskiĝi tia grandega talento de arkitekto-aŭtodidakto, kies majstreco ĉarmis ankaŭ multe da eŭropaj vojaĝantoj.

Kolju Fiĉeto naskiĝis en 1800 jaro en la bela apudmonta urbeto Drjanovo. Frue li restis sen gepatroj kaj jam dekjaraĝa komencis labori kiel novico kun la tiamaj majstroj-konstruistoj. Li estis ĉarpentisto, poste laboris kun albanaj ŝtonmajstroj, kun konstruistoj el Bracigovo. Li vagis al Italio kaj kons-

truis ne nur en nia lando, sed ankaŭ en Istanbul ka. Diplomon el la akademio de la vivo li ne ricevis, sed ĉiujn ekzamenojn li faris por „perfekta“.

Delonge oni rakontas, kiel la turka estro de Ruse-distrikto, Midhat paŝao, decidinte konstrui ponton super rivero Jantra apud Bjala, venigis la faman majstron kaj donis al li mallongan tempon por respondi, ĉu li povas konstrui la ponton kaj kiom da mono ĝi kostos.

Kolju Fiĉeto nur dum unu semajno ellaboris el vakso la modelon de la estonta ponto kaj kalkulis ĝuste, kiom da mono ĝi kostos. La paŝao ekmiris: „Ĉu estas eble, ke oni konstruu ponton tiom malkare!“ La respondo de Kolju Fiĉeto fariĝis devizo por la nuntempaj konstruistoj:

„Paŝao efendi¹, se mi ne konstruus la ponton laŭ mia modelo nur por 700 000 groŝoj, prenu mian kapon!“

La vera majstro konas la valoron de sia laboro.

En la streĉa konstruado de nia estonteco Kolju Fiĉeto estas figuro, kiu transformiĝis en simbolon de laboremo sindonemo kaj respondeco.

Ivan Severnjaŝki

¹ Efendi (turka) — sinjoro.

N. Kabakĉieva

LA MALĜOJO KAJ LA FORTO DE LA HOMO

Mi vidis ilin ĉe la haltejo. Ŝi — juna, blukula virino, kaj kvar buboj. La beleco de ĉi tiu virino ankoraŭ pli reliefigis sur la fono de la funebraj vestoj. Kiun ŝi estis perdinta? — mi pensis. Mi ne volis supozi, ke ĉi tiu multnombra familio estas orfiginta, ke jam mankas la apogkolono — la patro... Mi observis la knabon, kiu helpis unue siajn fratinetojn kaj poste la patrinon, por ke ili enbusiĝu. Mi eniris post ili. Bobi, la knabo, montriĝis komunikiĝema, havis naŭ jarojn, la aliaj infan-

La ponto apud Bjala



noj — ok, sep, du kaj duonon. Ili vizitas lernejon kaj la etulo estas en infanvaritejo. Ili loĝas en kvartalo „Ĥristo Botev“, strato „504“. Li, Bobi, helpas hejme, espondekas pri la lavado de la teleroj. La granda fratino lernas kuiri kaj la malgranda ordigas la litojn. La patrino? Ŝi laboras, vendistino estas. La avino ankaŭ laboras. Do, la infanoj dum la tago estas solaj, sed vespere, kiam revenas avinjo kaj panjo, estas tre bone. De la knabo mi komprenis, ke la patro pereis antaŭ tri monatoj ĉe katastrofo. Mi fiksrigardis por momento la junan patrinon. Malĝojo estis en ŝiaj okuloj. Sed tie videblis ankaŭ la forto, kiu sukcesas organizi ĉi tiun vivoplenan infankolektivon. „Malbono venis, — diras la homoj, — devas esti travivita!“ Sed nur tiuj, al kiuj vere estas veninta la malbono, scias kiamaniere oni travivas la morton de la kamarado, de la patro.

La bulgarino multfoje pruvis sian spiritan potencon en malfacilaj momentoj, sian kapablon unuigi la infanojn anstataŭi la patron. Tian homon mi observis dum veturado per la aŭtobuso, kaj la plej bona pruvo pri tio estis la simpla, inda konduto de la infanoj.

El la bulgara: Georgi Miĥajlov

ESTAS TIA ORKESTRO

La ideo fondi blovorkestron, en kiu la lernantoj uzu Esperanton, naskiĝis ĉe mi la pasintan someron. Mi scias, ke la esperantistoj bezonas similan orkestron ĉe solenaj kunvenoj, renkontiĝoj, kongresoj. Ĉio devis esti bone pripensita, oni devis veki intereson ĉe la infanoj.

Unuavide, la ideo estis facile realigebla. Sed kiel komenci? Literaturo pri tiu afero ne estas. La malfacilaĵoj venis aparte pro la aĝo de la triaklasanoj. Ni certigis duhoran E-instruadon semajne. Instruis Nikola Godev — instruisto-esperantisto. Mi okupiĝis pri la solfeĝo. Ĝi estas necesa bazo por la estonta laboro kun fanfar-orkestro. Iom post iom mi komencis enkonduki en la lecionojn ankaŭ E-parolon. Tio estis facila, ĉar la muzika terminaro estas la sama. Komenciĝis la ekzercoj per la fanfarinstrumentoj. La rezultoj superis nian atendon. Ni preparis nin kaj unuafoje manifestis niajn atingojn je la 24-a de majo. La impresoj estis tre favoraj. Pri ni ekinteresiĝis multaj homoj.

Antaŭstaras la tasko el fanfara transiri al kupra-ligna blov-orkestro. La plej grava estas fari ekzercojn. En la somero ni organizis ten-

Bulgaraj esperantistoj!

Por 1977 j. abonu ĜIS LA FINO DE NOVEMBRO PERE DE LA POŝTO la revuon „SCIENCA MONDO“ — organo de la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj — grandformata, 32-paĝa, sur luksa papero, kun varia popularscienca enhavo, 4 numeroj jare. Abontarifo: 1 levo por Bulgario, 1.64 levoj por socialismaj landoj, 1,96 levoj por nesocialismaj landoj.

Abonu ankaŭ la revuon „PACO“ — organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM):

por Bulgario — 3 levoj, por socialismaj landoj — 3,54, por nesocialismaj — 3,90 levoj.

La fanfar-orkestro de la juraj esperantistoj en Velingrad



dar-lernejon ĉe la Nigra Maro en Burgas, kie la lingva preparado daŭris plu. Por 1977 ni intencas veturi al internacia Esperanta infan-tendaro en Hungario.

*Ivan Sergeev
Laŭ j. „Ĉepinec“, № 10 | 1976*

DEZIRAS KORESPONDI

Pollando

Anna Ramza — Radlowska — 42-200 Czenstochowa, ul. Deglera 27/31 (34-jara, dramaktorino — kun ĉi pri literaturo, muziko, teatro, kino, reciproka gastado, bk, modrevuoj, gram. diskaj k. a.)

Szwarc Eugeniusz — 62-870 *Blaszk*, str. Swierczewskiego 11 m 3, woj. Sieradz (22-jara laboristo — kun ĉi pri literaturo, moderna muziko, reciproka gastado, bk, magnetofonkasetoj k. a.)

Janusz Fronczak — 99-440 Zduny, Strugienice 119, pow. Lourcz (21-jara — kun bulgaroj — muziko k. a.)

Maria Zejer — ul. Gwardii Ludowej 1, 43-450 *Ustroń* (46-jara oficistino en hospitalo — pri Esperanto, libroj k. a.)

Ewa Melcer — ul. Hibnera 10/6, 60-213 *Poznań* (29-jara — literaturo, lingvoj, vojaĝoj)

Serge Kozacki — ul. L. Oclowskiej 5a/12, 18-300 *Lambow* (lernanto — pri geografio, astronomio, bk, pm)

Zita Winniska — Szarotki (3) 6, 71-604 *Szczecin*.

Irena Neprej — Biala Nizna 69, 33-330 Grybór, woj. *Nowy Soncz* (18-jara — muziko, filmoj)

Krystina Milanowska — 85-319 *Bydgoszcz*, ul. Paura Findera 12/36 (24-jara muziko, bk, pm, junulara vivo)

Zygmunt Baranowski — Pradzynskiego 7 m 11, 26-600 *Radom* (kun ĉi pri ĉt)

Halina Szczurek — 37-410 *Ulanow*, ul. Glowackiego 17 (23-jara studento — kun bulgaroj — pri muziko, teatro, literaturo)

Eugenia Kielbasa — *Potok* 30, 38-404 Turaszówka, woj. Krosno n/V (20-jara — turismo)

Danuta Durska — 64-100, *Leszuo*, ul. Kuprienskigo 2 (17-jara — kun ĉi pri muziko, filmoj, sporto, bk)

Janucz Konderak — 62-261 Lednogóra, woj. *Poznan* (17-jara — pri muziko, sporto, teatro)

Rumanio

Bunea Bunescu Ion — str. Konstantin Ivanus 62, *Bukureŝto* 39 (kun ĉi — pri esperantajoj, pm, bk)

Sovetunio

Gena Nemcev — *Omsk*, ul. 24 dom 165 kv. 65 (21-jara — kun samaĝuloj el Bulgario)

Balčyčiui Pintāras — Pareljo 17-4, *Kaunas* 5, Litovio (15-jara — kun ĉi pri moderna muziko, gram. diskaj, sporto)

Artemjeva Tamara — *Ostrovskogo* 45-9, *Bobrujsk* 9, Belorusio (23-jara inĝenierino — pri literaturo, muziko, pm, pupoj en naciaj kostumoj)

Tiia Urbla — *Tallinn* 200 013, *Kotka* 10-46

(22-jara studentino — kun ĉi pri ĉt, pm, bk, gram. diskaj)

Geknaboj — novaj esperantistoj — deziras korespondi tutmonde. Skribu al ilia komuna adreso: Sovetunio, *Kiev* 252 157, ul. Potapov 12, ŝkola 197, Klubo de Internacia Amikeco (KID) „Planedo de Amikeco“. Respondo certa.

Skribu amase al la membroj de Esperanto-klubo „Ora Pordego“ en *Kiev*. Komuna adreso: Sovetunio, *Kiev* 252 200, Minskoe ŝose 10-99, Lineckij Mihail.

Tutmonde deziras korespondi la membroj de la Studenta E-Klubo „Revo“. Komuna adreso: Sovetunio, 625 009 *Tjumen*, abonkesto 139, Esperanto-Klubo „Revo“.

Leili Linas — 202 900 *Viljandi* Mäe 14—2, Estonio (26-jara ŝoforino — bk kaj pm)

10 gejunuloj dez. korespondi kun ĉi pri E-movado, revuoj, pm. Komuna adreso: *Ĉernij Ostrov*, Hmelnickaja obl., str. Oktjabrskaja 7, Biblioteko por junularo, la Esperanto-klubo

Kopta Oleg — 281 410 *Ĉernij Ostrov*, ul. Frunze 11, Hmelnickaja obl. (17-jara lernanto — kun ĉi pli ĉt, pm, gram. diskaj, esperantajoj)

Beškarev Viktor — Rezervnaja 11, kv. 3, 603 009 *Gorkij* (sperta esperantisto — serĉas seriozajn korespondantojn)

Laimuis Straznickas — 234 365 *Stakliškes*, Prenu raj., Litovio (17-jara — kun ĉi pri estradamuziko, naturo, pm, bk k. a.)

Laima Bulianskaite — 234 365 *Stakliškes*, Prenu raj., Litovio (16-jara lernantino — kun ĉi pri estradamuziko, naturo, pm, bk k. a.)

Kulčickij Aijoŝa — *Kiev* 133, bul. Lesi Ukrainki, 24-b, kv. 68 (15-jara lernanto — pri faŭno)

Vladimir Aleksandrov — 245 110 *Sostka*, K. Marks 101, Ukrainio (pri ĉt, pm k. a.)

Šalaveute Natolia — *Šiauliai*, Lenin 171-24, Litovio (17-jara lernantino — pri ĉt, bk, pm)

Viktoria Natin — 683 006 *Petropavlovsk* na Kamčatke, bul. Ribackoj Slavi 30, kv. 10 (15-jara lernantino pri ĉt, bk, gr. diskaj)

Maria Mejheŝ — 295 530 *Korolevo*, ul. Kalinina 8, Zakarp. (23-jara muzikinstruistino — kun ĉi pri ĉt)

Roza Citlaŭ — 492 018 *Ust-Kamenogorsk*-18, a/k 312 (22-jara studentino — kun ĉi — bk, insignoj, gram. diskaj)

Martemijanov Konstantin V. — 460 000 Orenburg. Poŝtejo, ul. 8 marta 30, kv. 9 (kun ĉi pri st)

La 22-an de julio en Sofio forpasis

Ivanka Rajnova Daskalova

En la fruaj periodoj de la bulgara E-movado ŝi donis senrezerve valoran kontribuon en ĉiuj iniciatoj de la sofiaj esperantistoj. Ŝi restis fidela al la Movado ĝis sia lasta spiro. Antaŭ kelkaj jaroj Daskalova kaj ŝia amikino Donka Atanasova-Abadžieva estis honoritaj de la Sofia esperantistaro.

